

# Laŭokaza Novaĵletero

organo de la

**Internacia  
Komerca kaj  
Ekonomia  
Fakgrupo.**

Redakcia adreso :  
19 Cranbury Road,  
Eastleigh, Hants.,  
SO5 5HB,  
Britio.

IKEF

★

1984

Numero 21;

junio, 1988.

Laŭokaza Novaĵletero,

junio, 1988a.

## E n h a v o .

<u>paĝo</u>	<u>titolo(j)</u>	
2	Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo.	
3	Interkonatiĝo; Administrado; Recenzo.	
4	Nova redaktoro	Lorens' Mi.
5	Ni utiligu modernajn rimedojn	Ak. Eichholz.
6	- la sama - daŭrigo	
7	- la sama - fino Nova oficejo laboras per Esperanto Memorigilo	Ak. Bormann.
8	Manko de lingvistoj . . . Esperanto en radio	Michael Dynes.
9	Terminologia laboro - raporto	Hans Wiersch.
10	Personaj komentoj - IKEV	Lorens' Mi.
11	Reklamanonco - Kovaleks	
12	Reklamanoncetoj Teknike pri la LN-o.	



Laŭokaza Novaĵletero

Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo.

- La Estraro:*  
 S-ro Franz Josef Braun, Prezidanto kaj Gen. Sekretario  
 S-ro Roland Rotsaert, Financa Konsilanto  
 D-ro István Gether  
 S-ro François-Xavier Gilbert  
 S-ro Lawrence Mee  
 D-ro Marco Picasso  
 S-ro Seikó Yamasaki

*Revizoro por la financa raportoj:*  
D-ro Gianfranco Polerani

*Centra sidejo (provizora):*  
 Hornisgrindestrasse 8,  
 7580 Bðhl 16, Okc. Germanio.

*Financa sidejo:*  
 Visspaanstraat 97,  
 8000 Brugge, Belgio.

*Redaktoro de la Laŭokaza Novaĵletero:*  
S-ro Lawrence Mee,  
19 Cranbury Road,  
Eastleigh, Hants., S05 5HB, Britio.

-oOo-

Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo.

Pagoj -- Perantoj -- Kotizo

Ciuj landoj: Baza kotizo: 400 belgaj frankoj aŭ 20 nederlandaj guldenoj.  
Poŝtĉekkonto belga, (Bruselo): n-ro 000-1592629-83  
je la nomo de IKEF, p.a. R. Rotsaert, Visspaanstraat 97, 8000 Brugge, Belgio;  
Konto ĉe Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam, Nederlando,  
je la nomo de Int. Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo, Belgio.

Perantoj:

- Britio*  
- provizore vakas -
- Jugoslavio*  
S-ro S. Taleski,  
ul. 'Oslo' br. 12,  
91000 Skopje.
- Suda-Koreio*  
S-ro Han Moo-hyup,  
CPO Kesto 5154,  
Seoul.
- Novzelando* Kotizo: 20 dolaroj.  
S-ro J.C. Rapley,  
P.O. Box 70-038,  
Ranui, Auckland 8.
- Togolando*  
S-ro Koffi Gbeglo,  
B.P. 13169,  
Nyékonakpoé, Lomé.
- Okc. Germanio* Kotizo: 20 markoj.  
S-ro F.J. Braun,  
Hornisgrindestrasse 8,  
7580 Bðhl 16.  
(Volksbank Bðhl 713104 - BLZ 66291400)
- Hungario*  
S-ro J. Horvath,  
Varsányi Irén u. 8,  
1027 Budapest.
- Italio*  
D-ro M. Picasso,  
via De Gasperi 7,  
20057 Veduggio al Lambro.

I N T E R K O N A T I O .

Sajne nur pro prokrastoj flanke de la poŝtinstancoj,  
ni ne ricevis ĝustatempe sciigojn por tiu ĉi rubriko.

A D M I N I S T R A D O .

La reto de Perantoj de IKEF.

Pro premo de aliaj aferoj, nia ĝisnuna Peranto en Britio, S-ro P. Foss, en Pilton, devas demisii el la posteno. Dankante S-ron Foss pro aktiva partopreno en niaj aferoj, kaj volante por li ĉian sukceson en la kampoj kiuj malpermesas al li dediĉi plu la bezonatan tempon reprezenti nin en Britio, ni petas sinproponon de alia membro nia en tiu lando, akcepti la perantan mantelon. Sinproponoj al la Financa Konsilanto ni petas.

-oOo-

RECENZO fare de Lorens Mi.

La letero de l'Akademio de Esperanto; eldonita de: La amikoj de l'Akademio de Esperanto, 5 rue Léon Cogniet, 75017 Paris, Francio; jarabono 120 fr.fr.; Unua kajero, okt. 1987 kaj dua kajero, jan. 1988.

La celo de la eldonaĵo estas klare priskribite esti: Por aŭdigi sian voĉon, por ĝuste aŭskulti kaj rapide respondi al la demandoj de Esperantistoj(,) la Akademio nepre bezonas organon. Tial, ni proponas al ĉiuj Esperanto-uzantoj: membroj de Akademioj, de Universitatoj, (kaj al) verkistoj, sciencistoj kaj teknikistoj aboni "La letero de l'Akademio de Esperanto"(,) kiu aperos trimestre.

Krome, la prospekto aldonas: "La Letero" estas destinita al ĉiuj, kiuj ŝatas flegi Esperanton kiel lingvon unuecan(,) kaj volas ĝin kultivi kiel belan sed ankoraŭ minacatan planton. Ĝi (La Letero - Red.) prezentos respondojn al demandoj de legantoj, deklarojn de Akademianoj, decidojn de la Akademio, (kaj) nuntempajn problemojn pri la Lingvo Internacia.

Tuj mi tiru atenton al la plibonigoj en interpunkcio, kiujn mi aldonis al la citaĵoj. Kaj tio estas mia daŭra reago, ke la tuto de tiuj ĉi du unuaj kajeroj estas tre malfacile legeblaj pro manko de

zorgo pri interpunkcio. Estas fakto, ke mi devis retajpi la enkondukan artikolon, aldonante kaj plibonigante la interpunkcion, antaŭ ol mi povis legi tiun artikolon sufiĉe flue por kapti la sencon de ĝi. En privata letero al mi, la Prezidanto de la Akademio agnoskas tiujn mankojn kaj promesas, ke ekde kajero 3 la kompostisto pli zorge atentos pri interpunkcio. Bone!

Gravas, mia opinie, ke verkistoj verku por esti legata kaj komprenata. Verkistoj en la i.l. devas rekoni, ke la legantaro plej verŝajne troviĝas en ĉiuj kontinentoj de la mondo; gravas, do, kontrollegi la kompostitan tekston per okuloj malfermaj al kutimoj preter la landlimoj de la gepatra lando.

Tiujn kritikojn farinte, mi havas nur labdojn por la vera enhavo de la kajeroj, kaj mi rekomendas abonon por ĉiuj seriozaj Esperantistoj. La du kontribuoj al la rubriko, Kroniko de la nuntempo, estas ambaŭ serioze verkitaj kaj legindaj, kaj la rubriko, Demandoj kaj Respondoj, trafas priskribas aktualajn problemojn, kaj donas seriozajn respondojn.

Mi antaŭvidas gloran estontecon por la Letero, esperante, ke ne multaj ricevintoj de la specimenaj kajeroj estis forpuŝitaj per la evidente malzorga traktado.



## Nova redaktoro;

## nova voko por kunlaborado!

Estante membro de la Fakgrupo, mi ne povas ne esti konscia, egale kun la aliaj membroj, pri tiu nia granda, komuna ŝuldo al nia Prezidanto, Sinjoro Franz Braun, samtempe kunfondinto de la Fakgrupo kaj jam dum tro da tempo ŝarĝata ankaŭ per la taskaro esti provizora Ĝenerala Sekretario. Eble pli bone ol aliaj membroj, mi estas konscia pri la vera pezo de tia taskaro sur la ŝultroj de grandanima homo, kiu ja ne povas flankenmeti la zorgojn de pangajna laboro en moderna fabrikejo, okupante seĝon al kiu venas konstante problemojn por kiuj solvoj estas bezonataj, ofte urĝe bezonataj. Krom tiu 'profesia' vivo, nia Prezidanto diligente prizorgas familion kaj familian hejmon per farado de tiuj taskoj normalaj kaj konataj al multaj el ni.

Malgraŭ tiuj multaj ŝarĝoj sur sia tempo, S-ro Braun tamen dediĉis kiel eble plej multe da tempo ankaŭ al redaktado de nia modesta revueto, dum plena jaro kaj duono. Tute certe mi esprimas la sentojn de ĉiuj membroj kiam mi diras:

Ni konscias la ŝarĝon kiun vi portis, kaj pro via portado de ĝi ni unuanime diras, Tre koran dankon!

Cirkonstancoj en la finaj semajnoj de 1986 malebligis al mi daŭre plenumi taskon, kiun mi ŝatas, kaj mi demisiis kiel redaktoro. Nun dum kelkaj monatoj mia vivo estiĝas pli kaj pli trankvila, (ne tute sen zorgoj, kompreneble, sed kiam mi rekonas, ke eble la plej peza zorgo estas provi devigi mian komputoron dece prizorgi la apartajn literojn de nia lingvo - kaj vi certe notas, ke ĝis nun mi ne sukcesis en tio! - mi devas rekoni, ke mi estas tre bonŝanca ulo), kaj kviete venis al mi la konstato, ke mi ja povus denove meti mian ŝultron al la muelila rado. Jen, do, la rezulto. Esper-eble, miaj provoj kontentigos ankaŭ vin.

Sed jam nun je la okazo de mia unua 'ĉefartikolo', mi sentas, ke mi ne havas veran elekton de temo por ĝi: nepras fari vokojn por pli aktiva vivo por la Fakgrupo, por pli ofta utiligo de la ŝancoj malfermaj al ni, pruvi la ekziston de konsciaj Esperantistoj, kiuj ja povas rilati kun la mondo en la kampoj de komerco kaj ekonomio, por prenado kaj portado de funkcioj en la Fakgrupo, kaj por partoprenado en la kompilado de la organo de la Fakgrupo, tiu ĉi Laŭokaza Novaĵletero, per verkado de raportoj kaj artikoloj.

Inter la eroj de tiu listo, eble la plej grava en la nuna momento estas tio de prenado de funkcioj: gravas, mia opinie, ke nia Prezidanto ankoraŭ portas du gravajn funkciojn. Ĉu vere ne eblas trovi inter niaj (mezaĝaj) membroj iun, al kiu eblas akcepti la ŝarĝon esti Ĝenerala Sekretario? Sinpropono de membro loĝante ne tre fore de la Prezidanto eble estus la plej avantaĝa aranĝo, sed tiu deklaro ankoraŭ lasas sufiĉe da eblecoj, ĉu ne? Tempo restas ankoraŭ antaŭ nia Jarkunveno dum la Universala Kongreso en Roterdamo, sed tia tempo rapide forflugas. Agu hodiaŭ!

Mia voko por raportoj kaj artikoloj estas egale aktuala. Tiu ĉi, la organo de nia Fakgrupo, estas samtempe via tribuno. Ne lasu ĉian spacon al mi!

Lorens' Mi.

Ni utiligu modernajn rimedojn  
por konatigi Esperanton,  
deklaras Akademiano Rüdiger Eichholz.

Ni ĉiuj konsentas, ke plej ofte homoj lernas Esperanton ne pro idealismo sed nur, ĉar ili vidos iun uzeblecon de la lingvo. Pro tio oni rekomendis lastatempe en revuo Esperanto la eldonadon de scienc-teknika literaturo grandkvante en multaj fakoj, aŭ -- pli realisme pro niaj malfortaj financaj rimedoj -- ke ni eldonu ĉiujare 50 ĝis 60 eldonaĵojn de diversaj specoj nur en la fako komputado. Tamen, kvankam inter ni troviĝas relative multaj fakuloj en tiu fako, eĉ tiu modesta tasko estus nur malfacile plenumebla, ĉar pri multaj modernaj nocioj ankoraŭ ne ekzistas trafaj fakterminoj. Krome, komputorika literaturo rapide malaktualiĝas pro invento de pli kaj pli kapablaj aparataroj kaj programaroj. Jam post unu aŭ du jaroj, libroj pri komputado malaktualiĝas; ili tial estas de malgranda utilo por ĉiu, kiu volas informiĝi pri la plej novaj metodoj.

Daŭre mi klopodas esti informita pri tio, kio okazas sur tiu ĉi rapidege evoluanta faktereno. Farante tion, mi vidis novan eblecon demonstri al la ne-Esperanta mondo la ekziston kaj utilon de nia lingvo. Kiam lastatempe mi prelegis dum internacia kongreso pri terminologio, en la urbo Trier, Okc. Germanio, mi spertis, ke ekzistas granda interesiĝo en la tiel-nomataj elektronikaj terminaroj.

Feliĉe, mi estas bone informita en tiu kampo, pro tio, ke danke al donaco al mi de subtenanto, mi akiras la programaron Termeks, kiu ja perfekte permesas al uzanto, tradukanto, konsulti elektronikan terminaron. Jam antaŭ mia partopreno en la kongreso mi estis provante uzadon de la nova programaro.

La metodo utiligi la Termeks-n estas sufiĉe facila afero por iu persono kiu jam kutimiĝis al uzado de komputoro dum tekstprilaborado. Kun Termeks jam disponebla en la efemera memoro de la komputoro, la tradukanto povas utiligi ĝin kiel helpanto por iu okazo de dubo pri la taŭga ekvivalento en la cellingvo por esprimi en la fontlingvo, kaj tion fari sen eliro de la baza tekstprilaborada programo. Sekve de premo de dediĉitaj klavoj, kaj klavado de la komencaj literoj de la serĉata esprimo, la komputoro vidigas, en la daŭro de malpli ol sekunda atendo, sur la ekrano la serĉata(j)n vorto(j)n an fonto- kaj cel-lingvoj. Konstatablas, ke tio estas pli konvene ol traserti multajn

vortarojn. Se iu serĉata termino mankas en la elektronika terminaro, la tradukanto tamen povas krei trafan tradukon kaj ĝin registri tie, por ke je venonta fojo ĝi pli povos trovi ĝin. Ĉiam ajn, iu ĝila traduko estas reviziebla, kaj aŭtomate kopiebla en la perlaboratan tradukaĵon.

Tiu Termeks-programaro ne estas mal multe kosta afero, sed tamen por tradukisto ĝi ja valoras la prezon. La terminaroj estas aparte aĉeteblaj, kaj ankaŭ tiuj ĝoni provas vendi sufiĉe altpreze.

Estas evidente, tamen, ke ne necesus investi multe da mono por krei por nia bezonoj tiujn terminarojn; ni devus nur pagi kompilanton, kiu disponas pri taŭga komputoro, por elekti la terminojn kaj ilin entajpi por la terminaro.

Buste tiuj altaj prezoj kaŭzis, ke mi vidis unikan ŝancon trudi nian lingvon al tradukistoj ankoraŭ ne rekonante la praktikan utilon de Esperanto: Ni kompilu gigantajn trilingvajn terminarojn, ĉiu kun ĉirkaŭ duonmiliono da terminoj el la plej diversaj fakoj, terminaroj en kiu estos troveblaj traduko el iu etna lingvo al Esperanto kaj al alia etna lingvo.

Por fari tion, ni unue registru malpli grandajn trilingvajn terminarojn sur memordiskoj, kaj poste ilin kunfandu ene de aparte grandkapabla komputoro, kapabla konservi grandegan kvanton da terminoj en efemera memoro de aparta speco.

La posta paŝo estas elektronike transporti la terminojn al diskoj de tiu tipo uzata nun por altfidela reproduktado de muziko, la tiel-nomataj kompaktaĵoj. Tiaj diskoj havas la kapablecon 'stori' ĝis 12 milionoj da vortoj, ĉiu facile retroveblaj per taŭga aparato.

Ankaŭ tia legaparato por la apartaj diskoj estas, nuntempe, sufiĉe kosta afero, sed notante la daŭran faladon de prezoj en tiu kampo, ni rajtas pensi, ke kiam venos la tempo en kiu ni estos pretaj registri grandan kvanton da terminoj, la kutima prezo estos ne pli ol la nuna kosto de aparato por aŭdigi la muzikajn kompaktaĵojn. En la kampo de komputoroj, multaj eblecoj baldaŭ ekzistos, pensante pri enciklopedi-similaj uzoj.

La ĝisnunaj produktistoj de elektronikaj terminaroj havas malfacilaĵojn protekti siajn registraĵojn kontraŭ kopiado, ĉar kopii unu memordiskon al alia estas sufiĉe simpla afero. La situacio ne



Ni utiligu modernajn rimedojn . . .

- daŭrigo

estas la sama pri la kompaktaĵoj. Se ni fine povos registri la terminaregon sur kompaktaĵoj, tiam ni povos vendi tiujn kompaktaĵojn je profito, kaj tiam ili tamen kostus al uzanto malpli ol kostus memordiskojn necesajn por registri la saman kvanton da teksto. Tial ni ne bezonas timi kopiadon. Kompreneble, ni kapablos vendi niajn kompaktaĵojn je tiuj favoraj prezoj nur, se ne necesas al ni pagi registrintojn.

Kial la unua cello estu Esperanto? Por ke la uzantoj de la terminaregoj ĉiam tiel vidu la Esperanto-tradukon, kiam ili serĉas tradukon por fontlingva termino.

Tion ili komence eble ne ŝatos, sed se ili havos malfacilaĵon elekti en la terminarego la plej trafan etnolingvan ekvivalenton por termino en la fontlingvo, ili vole-nevole serĉos helpon pere de Esperanto, kaj tiam spertos la klarecon de nia lingvo. Tial troviĝu sur ĉiu disko en la fontlingvo ankaŭ instrutekston pri Esperanto.

Ĉu tradukistoj aĉetos tiujn niajn kompaktaĵojn? Tion ili sendube faros se niaj terminaroj estas pli kompletaj, kaj malpli multekostaj ol aliaj, dulingvaj komerce haveblaj terminaroj, sen la Esperanto-teksto. Ĉar oni produktos por ni la diskojn bonpreze, se ni povos mendi ilin grandkvante, ni donacu parton de la eldonkvanto al universitatoj kaj al fakaj lernejoj por tradukistoj; tiam studentoj amase spertos la avantaĝojn de tiuj vortaregoj, kaj poste aĉetos ilin.

Post dek jaroj ekde nun, certe ĉiu intelektulo, eĉ en la ne alte evoluataj landoj, disponos pri komputoro; tiam ŝili preferos aĉeti niajn konvenajn, facile konsulteblajn diskojn ol turni paĝojn en multaj diversaj vortaroj, kiuj kostus pli ol kostus niaj diskoj. Niaj terminaregoj estos facile ĝisdatigeblaj, kaj ni povos konstante vendi ĝisdatigitajn versiojn de ili al antaŭaj aĉetintoj, je ankoraŭ pli malaltaj prezoj.

La ne-imageble granda storkapacito de la kompaktaĵoj sendube kaŭzos grandan ŝanĝon en la informo-tekniko. Se ni tuj eklaboros sur ĉi tiu kampo, tiam la uzado de Esperanto en elektronikaj terminaroj pli efike informos pri nia lingvo, ol reklamado per afiŝoj, faldfolioj kaj simile.

De kie ni prenu la registrotajn terminojn? Ni kompreneble ilin trovos en sennombraj jam presitaj vortaroj kaj terminaroj, kies enhavon ni registru en la

Termeks-formato. Ni tiel ne agus kontraŭ ies kopirajto, ĉar neniu eldonisto de vortaro akiris kopirajton por unuopaj vortoj aŭ terminoj, sed nur pri la elekto de la teksto kaj pri la maniero, en kiu tiu eldonisto prezentis ilin. Ni prezentos en tute alia maniero la vortojn kaj terminojn, kiujn ni trovis en centoj da diversaj vortaroj kaj terminaroj. Mi jam eksperimentis por trovi la plej taŭgan formon de registrado, sed certe ĝi estas ankoraŭ plibonigebla; mi volonte ekscius rekomendojn de kunlaborantoj je tiu projekto.

Ni ne bezonos kapitalon por registri la gigantan nombron da terminoj. Ĉiu kunlaboranto devus iom elspezi por akiri propran aparaton, por povi kunlabori. Bonŝance estas, ke tiu laboro povas esti plenumata de ĉiuj volontuloj, kiuj povas manipuli komputoron de la aparta tipo; tiu kunlaborado tiam pluiras samtempe.

Por manipuli komputoron ne plu necesas lerni programadon; ekzistas jam en multaj lingvoj pretaj aplikprogramoj kune kun bonaj lernolibroj. Mi mem intencas prepari lernolibron en Esperanto pri uzado de moderna komputoro kaj de teksto-prilaborilo: por ordinara komputoranto, kapabla, kaj diversmaniere uzebla teksto-prilaborilprogramaro estas la plej grava aplikprogramo. Tamen, por kompili Termeks-ajn terminarojn neniu teksto-prilaborilprogramaro estas bezonata. Kun Termeks venas aparta programo por prepari programon por faciligi la klavadon de specialaj literoj. Per ĝi mi jam kreis programon por ebligi elpresadon de la apartaj literoj por Esperanto.

Ĉu ni povas esperi, ke la bezonataj volontuloj troviĝas inter ni, kiuj pretas aĉeti por si komputoron kaj la Termeks-programon? Mi optimismas ĉi-rilate. Mi jam konatiĝis kun kelkaj kunlaboremoj, kiuj jam disponas pri komputoro de la aparta tipo, aŭ intencas aĉeti ĝin.

Ĉi-foje ni havas klaran avantaĝon antaŭ la angla lingvo: produktantoj de angla-lingvaj kaj nur etnolingvaj terminaregoj devus pagi la registrintojn. Tial iliaj terminaregoj sendube kostus pli ol niaj, eĉ se ni ĉiam aldonos Esperanton. Neniu komercisto investus monon por projekto, kiun konkuranto povus malpli multekoste realigi.

Al Esperantistoj, kiuj ankoraŭ ne estas konvinkitaj pri la mirindaj kapabloj de la Termeks-programaro, mi pretas provizi memordiskon kun demonstra teksto pri la tuto.

Ni utiligu modernajn rimedojn ...

- daŭrigo

kiujn avantaĝojn kunlaboranto havos? Nia rekompenco estu idealisma; ni entreprenu ĝin por montri la utilon de Esperanto, same kiel ni tradukas kaj publikigas sciencteknikan literaturon, kiu certe neniam donos finanĉan profiton. Kunlaborante je tiu projekto, oni ne nur havus la ŝancon vaste konatigi nian lingvon: ĝi devigus nin krei multajn terminojn por ke ni povu esprimi ĉion, kio troviĝas en etnolingvaj fakvortaroj; ni ricevus aŭtomate ĝuste tiujn terminojn, kiujn la ellaborintoj de la DLT-sistemo bezonas.

Memorindas, tamen, ke tiun kreadon de novaj terminoj ne ĉiu registranto devus plenumi: multegaj terminoj estas jam troveblaj en niaj fakaj terminaroj. Per registrado de ili, ni registros valorajn terminojn sen plua laboro. Aliaj terminoj troviĝas en la PeKoTeKo-projekto. Eĉ tiu simpla registrado de ekzistantaj terminoj estas interesa laboro, ĉar certe oni multon lernas el ĝi. Krome, ĉiu kunlaboranto ricevos interŝanĝe por sia laboro mirindan, multe pli grandan elektronikan vortaron ol tiun, kiun ŝili mem registrus.

Estus bone, se troviĝus volontulo, kiu transprenus la administradon de la tuta projekto, sed mi pledas, ke ni prokrastu kreon de burokrata organizaĵo. Mi petas pri sinproponoj, por ke ni baldaŭ ekregistradu kaj komencu pruvi al la cetera mondo, ke ni ja sukcese scias apliki modernajn rimedojn por forigi lingvajn barojn inter la homaro.

La taskoj estas grandegaj, sed realigo de tiu ĉi projekto metas nian lingvon en avangardan pozicion, kiun eĉ skeptikulo devos agnoski.

Notoj: Termeks, (TERMEX), estas registrita komerca marko; la prialudita raporto aperis en revuo Esperanto por novembro, 1987a, (paĝo 198).

Draste koncizigita de la originalo fare de lm; la originalo, aldonita al Cirkulero TC 88.1 datumita 1988-04-01, estas ricevebla kontraŭ du internaciaj respondokuponoj de la aŭtoro:

Akademiano R. Eichholz,  
Esperanto Press,  
Bailieboro, Ont., KOL 1B0,  
Kanado.

Represita el:

La Brita Esperantisto,  
por majo-junio, 1988.Nova oficejo laboras  
per Esperanto

La lan de marto, 1988, komencis labori nova oficejo por stimuli la interkompreniĝon en Eŭropo. Ĝi uzas por siaj translimaj kontaktoj la Internacian Lingvon Esperanto. La oficiala nomo estas "Oficejo por Eŭropa Interkompreniĝo nacilingve, "Büro Europaverständigung".

Ĉiujn kostojn por la kvar kunlaborantoj kaj la oficejo pagas ŝtataj kaj urbaj instancoj en Hamburg, (Federacia Respubliko Germanio). Jura portanto kaj idogvidanto de la oficejo estas la Societo por Internacia Lingvo. Bis nun tiu societo estis konata kiel eldoninto de "Interlingvistika Informa Servo". Inter aliaj taskoj por la Eŭropa oficejo estas instrui Esperanton al siaj dungitoj, por ke ili povu interkomunikadi eksterlande.

La nova oficejo serĉas kontaktojn kun ĉiuj homoj kaj grupoj, kiuj same kiel ĝi klopodas plibonigi la eŭropajn rilatojn aplikante tiucele Esperanton. Ĝi volas plenumi komunajn laborojn kun samcelanoj aliloke. Unuavice temas pri agadoj en la landoj de la Komuna Merkato, sed principo ĝi komprenas Eŭropon en ĝia geografia amplekso.

Interesitoj bonvolu urĝe anonci sin ĉar la subvencio ebligas nur unujaran ekziston - sed estas ŝancoj por plilongigi de ĝi. En la komenca fazo, kontaktuloj bonvolu skribi al:

Societo por Internacia Lingvo,  
Prez. Dr Werner Bormann,  
Schärstrasse 26,  
2050 Hamburg 80,  
Okc. Germanio.

oOo

## MEMORIGILO

Varbante novajn membrojn, aŭ pagante

vian propran kotizon, bonvolu memori,

ke la financa sidejo de la Fakgrupo

estas en Brugge, en Belgio, kaj ne

ĉe la Redaktoro en Britio.

oOo



## Mankoj de lingvistoj en (brita) industrio "aldonas milionojn al kostoj".

Tiel aperis, (en la originalo: Linguist shortages "costing industry millions"), kaplinio super recenzo, en la prestiĝa londona tagĵurnalo, The Times, je sabato, la 14a de majo ĉi-jare.

La temo de la recenzo estas raporto lastatempe eldonita de la politeknika kolegio de Novkastelo, kun la titolo, Lingvoj en brita komercnegocado, (en la originalo: Languages in British Business), kaj la recenzo reliefigas plurajn konkludojn en la raporto, el kiuj tiu por la kaplinio estas taksata kiel elstara.

La raporto baziĝas sur analizo de respondoj el pli ol 1 500 kompanioj al demandoj pri prepareco por la en-1992-malapero de doganoj kaj aliaj bariloj en Eŭropo. La kompanioj sur kiuj la esploro baziĝas situas en dek unu diversaj regionoj en Britio kaj komercas en pluraj sektoroj de la kampo, kvankam la raporto traktas ĉefe pri kompanioj kiuj fabrikas kaj eksportas pli-malpli pezajn varojn.

Elstara konkludo estas, ke la mankoj de stabanoj kapablaj flue uzi fremdajn lingvojn kostas milionojn da pundoj jare, pro perditaj eksporteblecoj. Kvankam tio estas grava, aktuala problemo por Britio, la rezulto povos esti nenio malpli ol katastrofa kiam la 'unueca merkato' efektiviĝos en Eŭropo. Aparte en la fabrikada sektoro, la esploro malkovris rektan korelativon inter kapableco efektive komunikadi pere de fremdaj lingvoj kaj sukceso en eksportado.

Ĝenerale, la raporto venis al konkludo ke kvankam la angla lingvo estas eble la ĉefa lingvo nun en la kampoj de diplomatio, scienco kaj tekniko, ĝi daŭre perdas renomon al aliaj lingvoj eŭropaj en la kampoj de komerco kaj industrio. Al pluraj observantoj, tiu tendenco estas daŭre konata ekde la aliĝo dum 1973 de Britio en la Eŭropa Ekonomia Komunumo, sed britaj kompanioj grandparte maldiligente restis blindaj al ĝi. Plejparte, tiuj kompanioj senproteste akceptis la sorton, asertas la raporto; ili daŭre provizis al konsulatoj ne-tradukitaj kaj ofte ne-kompreneblaj varprospektoj.

Kompanioj kiuj spertas pli da sukceso havas kronikon de dungado de specialistoj en lingvoj, kaj tiuj kompanioj spertas sukceson en eksportado, kvankam ĝajne la

stabanaro kiel tuto ne rimarkis la korelativon. Aliaj kompanioj, rimarkante, ke la bezonoj de uzado de fremdaj lingvoj estas maloftaj kaj pro tio la kosto de dungado de specialistoj estas ne-proporcie alta, neniam efektive frontis la decidon. Intertempe, kompanioj en aliaj landoj sukcesis regi la anglan lingvon kaj spertadis kreskantan sukceson, plialtigante la komercon en Britio per trioble en la daŭro de dek kvin jaroj.

La raporto asertas, ke britaj kompanioj daŭre perdas valorajn negocadŝancojn pro manko de la taŭga lerteco en la korevenaj lingvoj. Krome, la raporto konkludas, ke la koncernaj kompanioj neniel konstatas la perditajn ŝancojn. Klara konsilo estas, ke kompanioj devas doni plialtan prioritaton al lerteco en la kampo de fremdaj lingvoj, se Britio ne volas, ke kompanioj en rivalaj landoj prenu pli kaj pli grandan proporcion de la disponebla komerco en Eŭropo.

### Notoj:

la recenzisto estas Michael Dynes, al kiu ni proponu dankojn pro la okazo; la priludita raporto: *Languages in British Business: an analysis of current trends*, verkita de Stephen Hagen, kaj eldonita de Newcastle-upon-Tyne Politechnic, je prezo de 17.95 pundoj;

Tiun ĉi raporton verkis Lawrence Mee.

Reagoj al la raporto estus bonvenigitaj de la Redaktoro.

----- oOo -----  
Esperanto en radio.

La radio-elsendoj en Esperanto de Radio Vieno lastatempe grande plilongiĝis.

Du-foje dum dimanĉo, ĉiusemajne, la elsendo daŭras dudek kvin minutoj, ebligante pli da tempo ol antaŭe por aktualizaĵoj pri Aŭstrio mem, kaj pli da kontribuoj de aŭskultantoj.

La elsendoj okazas je 08.30horoj kaj 19.30horoj laŭ la grenviĉa horsistemo per frekvencoj de 6 155kHz kaj 11 915kHz.

Petu plenajn detalojn per letero al:  
La Esperanto-Redakcio de Radio Vieno,  
O.R.F.. 1136 Wien, Aŭstrio.

## Terminologia laboro, ene de la Fakgrupo.

Kunordiganto: S-ro Hans Wiersch,  
Tilsiter Strasse 39,  
7063 Welzheim, Okc. Germanio.

Du ampleksaj raporto pri nia progreso en la terminologia kampo aperis en LN-20, kaj intertempe ne multe okazis por devigi nin aperigi novan raporton. Sed ja unu evento meritas apartan mencion.

La kontakto, kiun Estrarano Gilbert starigis kun la Internacia Komerca Kambo en Parizo, la eldonanto de la tiel-nomata icocoo vortaro en ses lingvoj, preskaŭ tuj rekompencis la penon per invito viziti la sidejon de la IKC kaj tie diskuti niajn proponojn. Tia vizito estas jam aranĝita por la mezo de junio, kaj verŝajne jam antaŭ ol tiuj ĉi vortoj venos al vi la rezulto estos konata.

Kun S-ro Gilbert iros ankaŭ al Parizo nia Prezidanto kaj nia Financa Konsilanto kun ebla partopreno de kvara Estrarano-representanto. Eĉ trikapa delegacio ne povas ne fari bonan impreson ĉe la IKC, eĉ se ni ne rajtas esperi, ke el tiu unua diskuto ni rikoltos multon.

Nia konkreta propono al la IKC estas, ke je la (verŝajne baldaŭ) re-eldono de la icocoo vortaro, la ekvivalentaj terminoj en Esperanto aperu apude al terminoj en la aliaj ses lingvoj. La traduko de la terminoj estas jam finita laboro, kiel estis raportita pasintfoje, kvankam kontrolo laboro ankoraŭ daŭras. Pri la vera sinteno de la IKC al nia propono ni ne havas, ĝis nun, iun scion; ni devas atendi la raporton de nia delegacio.

Sed tre interesa punkto, kiu leviĝis tute klare al ni dum la traduklaboro, estas tio, ke en tiu icocoo vortaro jam troviĝas eraroj inter la ekvivalentoj en la ses lingvoj. Statistikoj pri la nombro de eraroj ne estas haveblaj, (kaj ja estas diversaj formoj de eraroj tiel, ke fari statistikojn pri ili estus peza laboro sen facile videbla valoro), sed pro ili ni ja rajtas verdikti, ke en la nuna stato, la vortaro parte estas fuŝaĵo.

Ĉu aŭ ne aliaj instancoj jam atentigis la eldonanton pri tiuj eraroj ni ne scias. Certe estas, ke verdikto de nia plurlingva teamo de tradukantoj kaj kontrolantoj alportas al la afero pli da sperteco ol iu unu-lingva instanco. Niaj konsiloj certe estus atentindaj.

Kaj jen ni venas al nia ĉefa punkto.

Ĉi-foje: nia plurlingva teamo.

Kun ĝojo ni akceptis sinproponon Akademiano Werner Bormann, en Hamburgo aliĝi al nia teamo.

D-ro Bormann estas bone konata, krom pro sia membreco de IKEF, pro multaj prelegoj pri ekonomiaj temoj dum la Internaciaj Kongresaj Universitatoj de Universalaj Kongresoj de Esperanto, kaj aliloke. Ĉi-jare, lia temo dua prelego por la IKU estas 'Ekonomio stimulas konpreniĝon'; por serio de prelegoj ĉi-sonde en la Akademio Internacia de la Sciencoj, lia temo estos 'Ekonomiaj agadkondicoj de metropoloj'. Pro dabra plivas iĝo de sia kampo de intereso, D-ro Bormann sentas pligrandigantan bezonon terminoj, kaj li kredas, ke pli aktiva partopreno en niaj terminologiaj laborredonos multon al li. Ni povas esti certaj pri tio ĉi, ke niaj rezultoj estas daŭre pli valoraj pro la kunlaboro de nia eminenta membro. Bezonata nun estas plifirmigo de nia organiza bazo por ierŝanĝi inter la membroj de nia teamo rezultojn de esploroj.

Bezonata ĉiam estas pli da sinproponoj de membroj, aparte de membroj kies gepatraj lingvoj ne estas jam reprezentataj en la teamo. Ne necesas, tamen, esti nova ita membro de la teamo por partopreni nia laboro. Sur alia paĝo troviĝas invito kontribui terminojn por niaj mankantaj en la IK-EVortaro; tiu invito estas malfermata al ĉiu membro.

Kaj alia sinteno estas proponita en artikolo de Akademiano Rüdiger Eichholz. Ni rekomendas zorgan studadon de aliaj tiuj kontribuoj, emfazante, ke ĉi tiuj spertoj ĝis nun diras klare, ke partopreno en terminologia laboro estas kontentiga okupo. Certe la unuaj paĝoj estas foje iom tedaj, pro la necesa studado de la baza tereno, (vidu la tiutempajn artikolon en LN-14, je paĝoj 5 - 7), sed tre baldaŭ poste komencas veni rikolto en la formo de pli firma rego de la lingvo, kaj fiero pri la evidenta bono de tiu lingvo. Senhezite ni rekomendanta partoprenon al ĉiuj niaj membroj.

glosa: icocoo vortaro -  
Key words in international trade:  
ICC Publishing S.A., Paris.  
ISBN 9284200234



Personaj komentoj pri dubindaj  
proponoj en la I.K.E.V.

junio, 1988a

Foje dum uzado de tiu ĉi valora kolekto de terminoj komercaj, mi malkovris kelkajn dubindajn kazojn, kiuj ŝajne enŝteliĝis dum kompilado, kaj formojn, kiuj jam nun arĥaigis. Kiam lastatempe oni petis min kunmeti liston de tiuj kazoj, mi tuj komprenis, ke eble aliaj membroj de IKEF volonte donus al tia listo konsideron.

Jen sube troviĝas la listo. Miaflanke, mi volonte legus komentojn de aliaj membroj, kaj publikigus proponojn alvenantajn al la redakcia skribtablo.

Ligita kun tiu ĉi projekto, mi proponas, ke ni starigu regulan rubrikon en la LN-o por publikigi proponojn por terminoj efektive mankaj en la I.K.E.V. Por ĉiu tia propono, necesus proponi unuarange difinon por la termino; aldono de nacilingva ekvivalento estus dezirinde, sed ne nepre ago.

Lorens' Mi

En la listo kiu sekvas, montrita unue estas la paĝnumero kaj due la rekoncifero.

33	275	'maklerajo' anstataŭ 'kurtaĝo';
46	381	'ĉenbutikoj' anst. 'ĉenmagazenoj';
80	672	la propono de 'mantelo' estas tre duba; mi neniam uzis la esprimon, sed mi proponas la uzadon de 'valorpapero' simple;
81	680	'debitoro' devas esti 'ŝuldanto';
87	727	'butikego' anst. 'grandmagazeno';
129	1060	'kurta ŝuldo' estas evidente erara; mi pretus akcepti la formon, 'kurtatempa ŝuldo' sed preferus la formon, 'mallongdaŭra ŝuldo'; kp. 2344: 'kurtatempa kredito';
149	1231	tie ĉi la difino en la angla lingvo ne sufiĉas; la unua frazo devus esti: "a form of instalment purchase plus hire until all payments have been made." sekve: la E.-lingva esprimo devas esti: 'luprenaĉetado' simple;
251	2039	'prospekto' estas Oficiala vorto, (PV p. 390); pli bona difino tie ĉi estus: 'presita reklamfolio disdonata kaj informanta la publikon pri, ekzemple, emisio de akcioj aŭ simile';
277	2256	korektigo estas bezonata por la lasta frazo: 'aldonvalora imposto' devas esti: 'imposto pro aldonita valoro';
288	2344	'kurtatempa kredito' aŭ 'mallongdaŭra kredito' anst. 'kurta kredito'; kp. 1060: 'kurtatempa ŝuldo';
306	2495	'mamserva butikego' anst. 'mamserva magazeno';
334	2718	la esprimo en la angla lingvo devus esti: "Value-added tax" aŭ, (kaj pli trafe) "Tax on the added value; V.A.T." sekve: la esprimo en Eo estas 'imposto pro la aldonita valoro; i.a.v. aŭ IAV';
345	2807	la proponita formo 'amortizi' estas rekte erara; ĝin forstreku. (Komparu: 'amortizi' PV p. 32.)

Notinde estas, ke sekve de tiuj korektoj, la indekso je paĝoj 350 ĝis 361 bezonos korektigojn.

Pluraj negravaj prezeraroj troviĝas en la verko, ne menciitaj supre.

Ankaŭ ne menciitaj supre estas la pluraj dubindaĵoj en la listo de landonomoj kaj valutoj, je la fino de la verko. Kiel konate, tamen, plena interkonsento pri landonomoj ankoraŭ ne estas atingite inter la kunlaborantoj en la kampo. Se deziro estus esprimata studi miajn personajn proponojn, volonte mi disponigus al IKEF mian liston, unue aperigitan en Akademiaj Studoj. Ĉiaokaze, kontribuoj de aliaj membroj estos benvenigitaj ĉe la redakcia skribtablo.



KOVALEKS kaj kompanio,  
Mollens, Svislando.

peras, importas, eksportas; laboras energie!

En suda Francio, apud Monaco sur la Mediteraneo, troviĝas nia vendejo por motor-kaj vel-ŝipoj brokantaj. Plena listo estas havebla post peto.

Ĉiuj uzitaj ŝipoj estas en bona stato, kontrolitaj persone de teknikistoj; ... longaj de 5 ĝis 35 m. kostaj de 60 000 fr.frankoj ĝis 3 500 000 us.dolaroj.

Se vi mem havas intereson, aŭ konas alian personon kiu havas aŭ havos intereson en tiu ĉi kampo, ne hezitu peti informojn ĉe ni, ĉar vi povus ricevi kutiman maklerajon de 1 ĝis 3 procento de la vendosumo.

Ni, kompreneble, havas intereson ankaŭ pri personoj kiuj volas vendi aŭ ŝanĝi ŝipon.

Por ricevi kompletan dokumentaron pri ŝipoj, haveblaj por vendi, skribu:

- Esperante al ni: Kovaleks S.A., 3974 Mollens, Svislando;

- Alilingve al : Agence Maritime du Cap d'Ail, Le Port, 06320 Cap d'Ail, Francio.

Profesie ni zorgas ankaŭ pri luigado de ŝipoj, kun aŭ sen ŝipanaroj, pri ŝipetoj aŭ ŝipegoj, je kosto de 800 fr.frankoj tage aŭ pli.

Egale ni povas ludoni ses-personan ŝipon, restante daŭre en la haveno, distance je 5 minutoj piede for de la fama duoninsulo de Monaco.  
Prezo: 300 fr.frankoj tage.

Kompreneble, nia kompanio volonte akceptus kunlaboradon aŭ kun aliaj ŝipvendejoj aŭ kun personoj finance interesitaj en tia negoco, kiuj pro neceso ne loĝas en la apudeco. Pri tio skribu al ni!



## REKLAMANONCOJ

## REKLAMANONCOJ

## REKLAMANONCOJ

Reklamtarifoj:

a) por Membroj de IKEF:

unu anonceto ĝis inkluzive  
ses linioj: senpage;por pli longaj anoncetoj:  
po 1 respondkupono, (irpk),  
por ĉiuj komenciĝantaj ses  
linioj de 27 literspacoj.  
Ĉiam: unuope mendendaj.

b) por ne-Membroj de IKEF:

po 1 irpk por ĉiu linio, aŭ  
por ĉiuj tri milimetroj de  
longeco, enkadrigita,  
sed kun minimumo de ok  
irpk-oj. Ĉiam antaŭpagita.  
Ĉiam: tri aperoj de la sama  
anonco en sinsekvaj kajeroj  
por la prezo de du aperoj.

Kurzo: 1 irpk = b.fr.

La Skolta Esperantista  
Ligovolas starigi aŭ renovigi  
kontaktojn kun ĉiuj nunaj  
aŭ eksaj Skolt(in)oj. Petu  
informojn de la (nova) Ĝen-  
erala Sekretario:S-ro David Withey,  
21 Brookfield Avenue,  
Liverpool L22 3YE, Britio.

Tiu

ĉi

spaco

estas

rezervita

por vi!

Reklami estas informi;  
ju pli vi informas,  
des pli vi vendos.  
Uzu la senkoston servon de  
via propra komunikilo:  
La Laŭokaza Novaĵletero.  
Kaj ĉiam legu la  
rubrikon, Reklamanoncoj.Atentinda el Ĉinio. Revuo  
Tutmondaj Sciencoj kaj Tek-  
nikoj, aperas kvarfoje  
jare, sub aŭspicioj de la  
Ĉina Akademio de Sciencoj.  
Petu informojn pri abon-  
eblecoj.Atentinda el Suda-Koreio.  
Revuo La Espero el Koreujo,  
aperas sesfoje jare, riĉe  
ilustrita pri rapide evolu-  
anta lando. La Redaktoro  
estas Membro de IKEF.

La Stelo.

La valida kurzo en Britio  
por la Stelo estas:1.00 pundo egalas al 3.465  
Steloj. Respondecaj pri ĝi  
S-ro Lorenz' Mi,  
19 Cranbury Road,  
Eastleigh, Hants., SO5 5HB,  
Britio. Petu detalojn,  
aldonante irpk-on.*Teknike pri la Laŭokaza Novaĵletero.*Respondeca redaktoro de la Laŭokaza  
Novaĵletero estas S-ro Lawrence Mee, ĉe  
la Redakcia adreso:19 Cranbury Road,  
Eastleigh, Hants.,  
SO5 5HB, Britio.Eldonanto de la Laŭokaza Novaĵletero  
estas Internacia Komerca kaj Ekonomia  
Fakgrupo, ĉe la provizora ĉefsidejo:Hornisgrindestrasse 8,  
7580 Bthl 16,  
Okc. Germanio.La Redaktoro kaj Eldonanto aperigas  
subskribitajn artikolojn sen aŭtomata ak-  
cepto de respondeco por opinioj tie esp-  
rimitaj.La rajto de represo estas malferma al  
ĉiu ajn persono aŭ instanco, kiu tiun  
rajton volas preni, kondiĉe nur, ke la  
fonto estu klare indikita.La limdato por ricevo de materialo por  
la proksima kajero estas la 10a de aŭg-  
usto, en Eastleigh, Britio.La originala teksto-paĝoj de la LN-o  
estas preparitaj sur folioj de la formato  
dinA4, (210 mm oble 297 mm), kun posta  
redukto al grandeco de A5 antaŭ presado.La maksimume disponebla spaco por art-  
ikoloj proponataj kiel 'prespretaj', do,  
estas 180 mm en larĝeco kaj 240 mm en  
longeco. Normala skribmaŝino tajpas 71  
literalspacojn en la larĝeco de 180 mili-  
metroj; alia tipo de maŝino skribas 85  
literalspacojn en la sama larĝeco. Tiuj du  
ciferoj estas por ni la maksimumoj norma-  
le uzataj.En longeco de 240 milimetroj, norma  
skribmaŝino povas meti 56 liniojn, inkl-  
uzive de iuj liberaj linioj; aliaj apar-  
atoj, ekzemple komputoroj, povas meti en  
longeco de 240 mm, 61 linioj. Ni pretas  
akcepti aŭ unu aŭ la alia.Similaj limoj rilatas al reklamanoncoj  
proponataj kiel prespretaj.La Redakcio bonvenigus artikolojn pro-  
ponatajn por aperigo en la Laŭokaza Nov-  
aĵletero, kondiĉe ĝenerale, ke la temo  
akordiĝas kun la sinteno de la Fakgrupo,  
kaj aparte ke la teksto mem obeas la reg-  
ulojn de la Fundamento de Esperanto kaj  
konformas al la normoj de interpunkcio,  
kaj tiel plu, normalaj en la LN-oj.